# KOMITATO de 11-a de majo 2026

Lundon la 11-an de marto 2026, de la 20a ĝis la 23a kaj 15 kunvenis pere de Zoom, la Komitato de Espéranto-France.

[ĉeestas: S = surloke, R = rete pere de Zoom, T = telefone pere de Zoom]

| PERSONA NOMO | FAMILIA NOMO | MALLONG. | KOMITATANECO | ELEKTO * | ĈEESTAS | SENKULP. | FORESTAS | RAJTIGAS |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Raymonde | COQUISART | RC | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Régis | FABRE | RF | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Bruno | FLOCHON | BF | Repr. de la membraro | **20/22/24** | | X | | XG |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Aleks | KADAR | AK | Repr. de la membraro | **2025** | R | | | |
| Michaël-Boris | MANDIROLA | MBM | Repr. de la membraro | **22/24** | R | | | |
| Sébastien | MONTAGNE | SM | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Marcelle | PROVOST | MP | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Bruno | ROBINEAU | BR | Repr. de la membraro | 23/25 | | X | | XG |
| Victor | SIMONNET | VS | Repr. de la membraro | 2025 | R | | | |
| Bertrand | VERSTRAETE | BV | Repr. de la membraro | 2025 | | X | | RC |
| Jean-Luc | THIBIAS | JLT | Repr. de fed. France-Est | | R | | | |
| Pierre | GAUTHIER | PG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | | R | | | |
| Isabelle | NICOLAS | IN | Repr. de fed. Limousin | | R | | | |
| Xavier | DEWIDEHEM | XD | Repr. de fed. Hauts-de-France | | R | | | |
| Claude | BENSIMON | CB | Repr. de fed. Bretagne | | R | | | |
| | | | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | | | |
| Thierry | SPANJAARD | TS | Repr. de fed. Provence | | | | | |
| | | | Repr. de FET | | | | | |
| | | | Repr. de FKEA | | | | | |
| Didier | JANOT | DJ | Repr. de GEE / ĬLEĬ-Francio | | R | | | |
| Briac | MILLON | BM | Repr. de JEFO/ Espéranto-Jeunes | | R | | | |

15 ĉeestis el 19, 3 senkulpiĝis, 2 donis povon.
Estas kvorumo (½) voĉoj

0.2 **Elekto de prezidanto kaj protokolanto** 1 min

XG prezidas, VS kaj MP protokolas

0.3 **Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj**

- Libro de Hannes Larsson [Murder in Pont-a-Mousson] (ni ne havis tempon pritrakti tion pasinta kunveno)
- ŝanĝo de la statutoj de UEA
- por la agadraporto ĉu ni devas sekvi la novan formon proponita de UEA : [AKIRI]

0.4 **Dato de la venonta kunsido** 2 min

Jam planita sabaton 23a de majo, dum la kongreso en Hérouville, posttagmeze 16:00 – 18:00 en la Videokonferenca ĉambro de la Domo de la Asocioj post la elekto de la novaj membroj

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

1.1 **Financa raporto 2023/2024.** DISKUTO 10 min

Sebastien opinias ke ne eblos publikigi la kontojn pri 2024 antaŭ la venonta kongreso. Peza laboro por RF kaj indas peti helpon, havi helpkasiston por regula librotenado. Por sekureco, venontjare iu alia devas povi agi sur la kontoj pri monĝiroj interalie.
Retaj kunvenoj de financa komisiono utilas por kune serĉi solvojn.
Se financa raporto ne pretas, ni povas prezenti nunan staton kaj pliposte proponi aprobon per reta voĉdono.

**Financa raporto 2024/2025**

Ankoraŭ ne finita. Bezonas kelkaj ŝanĝoj antaŭ submeti al la membroj por la voĉdono.

1.2 **Protokolo de la lasta komitatkunsido (23a de marto)** DISKUTO 5 min

https://esperanto-france.org/IMG/pdf/ufe-komitato-2026-03-23-protokolo.pdf
Jam sendita sed post la lasta kunsido ĝi estis ĝisdatigita kun la antaŭvidataj budgetoj de la kongreso 2027.

1.3 **Stato de la aliĝoj 2025/2026 kaj estonteco** DISKUTO 15 min

619 aliĝintoj hodiaŭ (596 fine de la antaŭa kotizjaro).
Progresas sed indas konscii ke estas dank'al alveno de pliaj kluboj (Herouville, Lorient, Hennebont), kaj efika ĉi jara aliĝkampanjo rete kaj poŝte. Tiu progreso ne kaŝu la malkreskon de la esperanto-movado ĝenerale en Francio. Ni devas labori por revigligi lokajn klubojn interalie per prelegturneoj. Necesas ankaŭ helpo al kreado de novaj kluboj por izolitaj esperantistoj. Eventuale krei laborgrupon por helpi klubkreadon (ne tuj formalan asocion, eblo krei arthur-konton por unuaj bazaj spezoj).
Ĉu bezonas krei komisionon ?

1.4 **Preparado de la 2026a ĝenerala asembleo** DISKUTO 10 min

- Kunvokilo sendota antaŭ tiu kunveno kaj balotilo ekde la financa raporto pretos
- la jara raporto pretas kaj legeblas en nia retejo: https://esperanto-france.org/IMG/pdf/jara_raporto_esperanto-france_2024-2025.pdf
- dankon legi kaj komenti por eventualaj korektoj/aldonoj.
- listo de kandidatoj kaj novaj kandidatoj por la venonta ĝenerala asembleo (lasta kk)
- ĝisdatigo de la listo de kandidatoj de la pasintaj jaroj Aleks Kadar, Gilles Tabard, Dominique Couturier kaj Michael-Boris Mandirola : 4 kandidatoj por 8 postenoj.

1.5 **Kunkalendaro** INFORMO 5 min

Komuna Google-kalendaro de laborkunvenoj disponebla por la kk/aktivuloj. Alia kalendaro pli larĝe disponebla kun (plezuraj) renkontiĝoj.

## 2. KONSCIIGO projektoj, (ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

2.1 **Ĝisdatigo de niaj komunikiloj :** DISKUTO 10 min

- **nova logotipo** : farita
- **faldfolio** : demando al BF ĉu tio povos esti preta antaŭ la komenco de la lerneja jaro ? Tio estas helpo al la lokaj grupoj.

2.2 **Preparado de la kalendareto 2027 kaj aliĝilo 2026/2027** DISKUTO 10 min

por pretigo antaŭ septembro. Atendi membrokunvenojn de UEA kaj ILEI por eventuala kotizŝanĝo..
Dum la ĝenerala asembleo, demandi al la anoj proponi ideojn por la desegnoj kaj sendi ilin al Robin.

2.3 **Trejnad-sesioj** INFORMO 5 min

Propono de nova kunveno pri Arthur kaj reta varbado de novaj membroj dum la baldaŭaj semajnoj.
Propono de kunveno kun Pierre Dieumegard pri la konsento de la akademio de Orleans/Tours de Esperanto

Loiret kiel kunhelpanta asocio komence de Julio. Pripensi proponi kunvenon vespere aŭ sabate antaŭtagmeze aŭ posttagmeze. Tio povos okazi komence de julio 2026. La invito estas sendota uzante ufe-membroj kaj aktivuloj.
Kun Dennis Keefe post Septembro, propono de trejnado pri komunikado. AK : Sean O'Riain diras, ke li volonte farus retan trejnadon.

2.4 **Eŭropa festo,** 9a de Majo, **DISKUTO** 5 min
EEU instigis agadon pri la okazo.
Pripensi instigi lokajn proponojn je tiu dato.
Okazis io ĉe Place de la République en Parizo sen esperantista partopreno.
Okazis budo en Strasburgo, invitita de la urbodomo. Publiko pli interesata ol ĉe asocia forumo.
Aliaj datoj: 26-a de Septembro, Eŭropa tago de lingvoj. 14a de Februaro

2.5 **Rezultoj de ikurso** **DISKUTO** 5 min
Kurso kun konata nombro de partoprenantoj. Demando pri estonteco de la lernantoj, proponi aktivaĵojn por allogi ilin poste (krei filmetojn pri ĉiĉeronado ekz.).

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

3.1 ***Le Monde de l'Espéranto*** **DISKUTO** 5 min
Rezultoj pri la lasta kunveno de la teamo, eldono prokrastita (presota fine de somero). Ni konstatis ke indas prokrasti por havi bonkvalitan revuon kiu estos tiel pli utila en septembro.

3.2 **Esperanto Aktiv** **INFORMO** 5 min
Pluraj renkontoj antaŭvidotaj : Thomas Creusot, Gabin Forcier, Musée des Langues Paris kaj aliaj temoj… kelkaj artikoloj el fejsbuko kolektitaj de RC

3.3 **Kongreso 2026** **INFORMO** 15 min
Stato de la nombro de aliĝoj : 116
Ni celas vendi la libron "Espéranto et espérantismes en France - L' utopie en pratique" de Thomas Creusot. ER ne estas tiom optimisma kiom ni esperas por havi tiun libron ĉe nia libroservo en Hérouville.
*(finfine ĝi ja estos)*

3.4 **Kongresoj 2027, 2028 kaj 2029** **DISKUTO** 10 min
Eŭropa kongreso 2027 en Carry-le-Rouet apud Marseille.
Kongreso 2028 organizota de Norda Federacio.
Kongreso 2029 : liston de eblaj kongresejoj en la Francilia Regiono ricevos RC

3.5 **Projektoj pri Arkivoj** **INFORMO** 5 min
Preparitaj arkivoj forportitaj el la Ĉerizejo. Ni plu kolektas arkivojn (unuekzemplerajn dokumentojn) personajn aŭ pri vivo de lokaj asocioj. Gravas pliriĉigi la kvantojn de tiuj arkivoj por montri ĝian ekziston. Nova subvencipeto farita kiel lastan jaron kun respondo en junio sed ni jam ricevis negativan respondon. Alia subvencipeto pli specifa estis farita pri numérisation" de pliaj arkivoj (inter alie, la Arkivoj de Lucien Péraire trovita poste en Greziljono, kun pli bona kvalito ol tiuj de la Ĉerizejo). Iu dungito en la Nacia Arkivo laboras pri niaj arkivoj. Ŝajnas ke la dungo estis sufiĉe facila ĉar la temo interesis

3.6 **Starigo de teamo pri prelegvojaĝoj** **DISKUTO** 5 min
kun naciaj kaj regionaj respondeculoj, ĉu novaj proponoj de prelegvojaĝantoj ? Ĉu ekzistas ?
En Eventaservo estas listo de prelegantoj. Eblas inviti prelegantojn kiam ni renkontos ilin dum kongresoj.
La grupo de Limoges havas intereson ricevi Thomas-n Creusot-n por prelegi. Dum la kongreso 2026, demandu pri lia intereso kaj kondicoj.

3.7 **Situacio de la muzeo de Gray** **DISKUTO** 5 min
La muzeo etis kreita antaŭ multaj jaroj de Géo Junier la patro de Micheline Château (nuna zorgantino). Micheline maljuniĝas kaj la propono de la urbestraro estas translokigi ĝin en alia loko kaj kun aliaj objektoj sen esperantisto por zorgi pri tio. Estas do iu danĝero por ke tiuj objektoj ne estos tre bone protektita aŭ perditaj inter ne-esperantaĵoj.

3.8 **Ambiciaj projektoj de Greziljono, ebla apogo de UFE** **DISKUTO** 5 min

Novaĵoj pri la situacio (paro da hungaroj Veronica Acsadi kaj Andras) surloke longtempe, projekto repreni havaĵojn de la muzeo de Gray en la unua etaĝo de kromdomo.
Andràs ekis legomĝardenon, kreis por si mikroentreprenon.
Veronika (Vera) Acsadi ne plu povas daŭrigi distance sian antaŭan laboron do pli zorgas pri Greziljono por eventuale fariĝi ia dungita profesia komerca direktoro.
Laboro por plikonfortigi la kastelon por pli allogi eksterajn klientojn kaj alireblecon por maljunuloj aŭ kripluloj. Ŝanĝi fenestrojn. Pligrandigi Zamenhof-salonon kaj tie aldoni necesejojn ĉar estas nur 2 teretaĝe ĝis nun. Pripensi plian ŝirmejon malantaŭ la nuna uzebla kiel stokejo.
Pripensi monpruntadon por financi parton de plia laboro. Krei laborgrupon por tion pristudi kondiĉe ke Greziljono povu daŭre repagi la ŝuldojn (ne funkciante ĉefe sur unu volontulo (Berto) sed sur pli profesiula funkciado).

3.9 **Ĵusaj eldonoj** **INFORMO** 5 min

3 novaj libroj presitaj. Prezentaĵo kun LPI kaj SB en la sidejo kaj per interreto lundon la 18a de Majo.

3.10 **UK 2026 en Graz Aŭstrio** **INFORMO** 5 min

936 partoprenantoj el 59 landoj inter kiuj 83 Francoj.
Movada foiro kun prezento "unua bulteno" de la Eŭropa Esperanto Kongreso en Carry-le-Rouet/Provenco.
Ĉu budo por UFE ? Jes, peto farota de VS. Kion ni prezentos : kalendareton, librojn eldonitajn, LME ? Kiu deĵoros TS, XG do la budo devos esti apud INOE, Greziljono… Ankoraŭ ni povos kontribui la temon de la UK ĝis la 13a de majo 2026.
2032 : UK en Francio ?

3.11 **Situacio de Vinilkosmo** **DISKUTO** 5 min

Inundo en la Vinilkosmo-loko kaj nova ŝanĝo de distribuanto por la elsendo de muziko.
Rilate kun Floreal. Pristudi alvokon al donacoj.

3.12 **JK : junulara kongreso en Katalunjo 2026** **DISKUTO** 5 min

Ĉu UFE povas subteni junulojn kiuj dezirus kongresi en Katalunjo ? La kostoj proksimume estas en tute 500 eŭroj po partoprenanto. AK proponas ke la kostoj por vojaĝo estos pagitaj de UFE. Estraro diskutos la aferon, la KK povos decidi en Hérouville kaj XG respondos al Briako. La krizo en TEJO estas grava pro la rifuzo de monhelpo de EU. Tuluza grupo helpos la junulojn kiuj rilatas kun la loka grupo.

## 4. KAPABLIGO (kursoj, ekzamenoj.)

4.1 **Ekzamenoj** **INFORMO** 5 min

Pri KER: Niveloj B1, B2, C1 kaj C2 dum UK kaj retaj ekzamenoj okazos dum julio 2026. Plie estos konkurso de plej bonkvalitaj parolantoj.
Pri FEI : dum kongreso en Hérouville saint Clair

**4.2 Metodo 12** **INFORMO** 5 min

en progreso (preparo de la desegnoj)